

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Svedio kaj
Tanzanio kuiras
kunlaboron**



**Finnlando
famigas fabelojn**



**Grass-verko *La
lada tambureto*
nun en Esperanto**



Arto konkurse stimulas arton

Vi trovos

201 *Malferme*

Laborplano kaj vivo

Mark Fettes

202 BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1950-1999

Sten Johansson



205 *Azio*

"Arde, amuze..."

Kep Enderby

206 Esperanto en radio

207 *Eŭropo*

Fabel-festo
en Finnlando

Raita Pyhälä



208 *Afriko-Eŭropo*

Kie suno kuiras,
Esperanto kuniras

Sture Andersson kaj Anna-Maria Lange

Mwanza – Montendre – Lund

Ambrose F. Polle

210 Reagoj

211 Navigo tra TTT-paĝoj

212 Recenzoj

Ziko Marcus Sikosek pri

Centjara asocia E-movado en Francio

Leif Nordenstorm pri

Esperanto en Ruslando

213 Laste aperis

Kaj plue...

214 Influe Fake

215 Lingve

216 Loke Foliume

217 Furoraĵoj de la Libroservo Anoncetoj

218 Forpaso

219 Indekso 2000

La kovrilo: Voĉlego el
Homero, Sir Lawrence
Alma-Tadema
(Filadelfia Art-Muzeo)

Dekstre: Haveno
en Idra, Grekio
(N. A. Tombazi)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establiĝinta kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32;
USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); infor-
miĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tua
ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



LABORPLANO KAJ VIVO

Mia frizistino entuziasmiĝas: “Ĉu vere? Mi tiom ofte aŭdis pri Esperanto lastatempe...” Aŭskultinte, ŝi tondas lastan harfasketon. “Sed ŝanĝoj ĉiam tiom daŭras...”

Vesperas Vankuvero. Mi enpremiĝas inter bunta busanaro. Ekstere, reklamoj vokas vjetname, urdue, ĉine. Hejme atendas niaj du denaskuloj. Kaj verkotasko.

Laborplano, lingvaj rajtoj: la menditaj temoj mal-fremdas, tamen foras. La frizistinon mi devus loki sub *Informado*; niajn infanojn sub *Kulturo*; la reklamojn, eble, sub *Plurlingvismo*. Mankas la rubriko *Vivo*.

Morgaŭ mi flugos al San-Francisko por paroli kun lingvistoj. Ili kredas kompreni la fenomenon lingvo, kaj tial ankaŭ Esperanton. Tipo: Bon-intencaj naivaĵoj. Ankaŭ ĉe ili, la rubriko *Vivo* mankas.

Nin modernulojn hantas rubrikismo. Por kompreni ion, por senti nin sekuraj pri ĝi, ni devas klasi ĝin. Sed mia Esperanto rezistas klasiĝi. Ĝi estas lingvo “neŭtrale homa”, kun ege persona signifo; ĝi kunigas idealojn kaj bagatelojn; ĝi revigas kaj elrevigas, surprize kaj senĉese. Kiel la vivo. Bussvingo. Alkroĉiĝo. Kaj eklumo.

Tion mi ja ŝatas en la Laborplano: ke ĝi provas ampleksi tiun tutan mirindan mondon. Nenio neglektindas aŭ neindas. Konversacio kun frizistino, kultivo de dulingva familio, esploroj pri lingvaj rajtoj, ĉio troveblas tie. Kiel siatempe la Manifesto de Raŭmo, ankaŭ tiu ĉi dokumento provas rigardi la E-realon kiel tuton integritan.

Sed ĝiajn rubrikojn ni ne traktu kiel sanktajn. Vivo pli gravas ol vizioj. Esencas jeno: Esperanto vivas pro tio, ke ni, ĝia socia bazo, vigle ideas, lingvas, agas. Sed tiu laboro, tiu vivo, estas tiel multfaceta kaj disa tra landoj kaj kulturoj, ke ĉiu el ni facile kaptiĝas en propra reto kontakta kaj kutima. Per konscia strebo *kunagi*, surbaze de komuna vizio, ni ĉiuj profitos — kaj kun ni la lingvo kiel tuto.

Por kio kunagi? Tion klarigis la Manifesto de Prago; ĝiajn idealojn la plano resumas per la simpla titolo “Al lingva demokratio”. Denove: ne regu nin rubrikoj. Esperanton ne facilas resumi. Al mia frizistino mi ne parolis pri “demokratio” aŭ “lingvaj rajtoj”, sed ŝi certe kaptis la ideon. Ofte pli efikas paroli pri konkretaĵoj, lasante la homojn mem malkovri la valorojn malantaŭ ili.

Kian komunumon konstrui? Laŭ la plano, pli profesian, pli junan, pli tutmondan: pli reprezentan pri la mondo ĉirkaŭa. Por ke ni iam iĝu potenca socia forto, tiu evoluvojo nepras. Sed ĝi ankaŭ indas senkondiĉe. La bunto de nia kulturo, ĝia idea gamo, la financaj kaj organizaj kapabloj de niaj organizaĵoj — ĉio povas profiti el tiuj prioritatoj.

Ankoraŭ mankas rubriko *Vivo*. Tamen nun mi konstatas, ke ne en dokumentoj ĝi serĉendas. Krei ĝin devas ni, la legantoj: el la fajreroj de niaj vivospertoj, el nia amo al la mondo.

Elbusiĝo. Miaj infanoj kuras brakumi min.

Mark Fettes



Belartaj Konkursoj: "Malfer"

Belartaj Konkursoj de UEA 1950-1999

Ĉampiono la dek-unuan fojon en Belartaj Konkursoj, Sten Johansson gajnis ĉi-jare trian premion per jena esejo, kies temo estas Belartaj Konkursoj mem.

Dum la 33-a Universala Kongreso en Malmö en la jaro 1948, la dua postmilita, la Komitato de UEA principe decidis okazigi literaturan konkurson kadre de la Universalaj Kongresoj. La unua tia efektiviĝis en la 35-a UK en Parizo, en la jaro 1950, kaj enhavis du branĉojn: Originalan poezion kaj Tradukitan poezion. Jam ekde la sekva jaro ankaŭ prozo kaj teatraĵo estis inkluzivitaj, kaj ekde 1952 la aranĝo estas konata kiel la Belartaj Konkursoj de UEA.

La Belartaj Konkursoj bezonas malmultajn jarojn por iĝi stabila kaj ŝatata tradicio, kaj jam ekde la mezo de la 50-aj jaroj ili okupas gravan lokon en la kongresaj programoj. Ili tamen ludas rolon ankaŭ ekster la kadro de la Universalaj Kongresoj kiel la plej konata literatura konkurso en Esperanto.

La branĉoj iom variis kun la paso de jaroj. Dum la unuaj 25 jaroj tradukaĵoj — precipe de poezio — estis grava parto, sed ekde 1976 la Belartaj Konkursoj koncernas sin nur pri originalaĵoj. Sola escepto estas la branĉo Infanlibro de la jaro, kie oni premias infanlibron eldonitan en la antaŭa jaro, negrave ĉu originalan aŭ tradukitan — efektive, preskaŭ ĉiam temas pri tradukita verko. Anstataŭ



Berlino, 1999:
al "la reĝino de la Belartaj Konkursoj", Marjorie Boulton, BK-prezidanto Vilmos Benczik transdonas la libron *Lingva arto*, omaĝe al ŝi kaj William Auld, multjaraj korifeoj de la Konkursoj.


Ekde 1966 oni gravuras la nomojn de "Novaj Talentoj" sur ĉi tiun pokalon, donacitan de s-anino Gigi Harabagiu memore al sia frato Henry (1909-1944).

la tradukaĵoj aldoniĝis iom post iom aliaj branĉoj: Eseo (ekde 1976), Fotografo (1976-95), Porinfana literaturo (ekde 1979), Kanto (ekde 1984) kaj Vidbendo (ekde 1992). Fojfoje aperis ankaŭ aliaj okazaj branĉoj. La du branĉoj kun plej ampleksa partopreno tamen estas Poezio kaj Prozo.

4500 verkoj, 600 premioj

Dum la 50 jaroj da Belartaj Konkursoj pli ol 4500 verkoj partoprenis. Sescento da premioj estis atribuitaj al preskaŭ 250 personoj el 40 landoj. La reĝino de la Belartaj Konkursoj sendube estas Marjorie Boulton kun 22 premioj dum 11 jaroj.

En la listo de premiitoj oni povas sekvi longan vicon da konataj Esperantaj verkistoj. Jam en 1950-52 aperas la skota kvaropo: William Auld,



UEA, F. Verhey

la unua premio estis aljuĝita en neniuj branĉoj! Sub nova komisiono la premiado denove ekfloris, eble dank' al nova generacio de partoprenantoj. Inter tiuj oni trovas Karel Piĉ kaj Bernard Golden ekde 1976, Rejna de Jong en 1977, Spomenka Ŝtimec kaj Éva Tófalvi de 1978, Mauro Nervi de 1979.

El pli malfruaj jaroj eblas mencii antaŭ ĉio la iberan lavangon: Liven Dek ekde 1987, Jorge Camacho ekde 1989, Gonçalo Neves ekde 1991 kaj Miguel Fernández en 1993. Plue Krys Ungar en 1989, Ulrich Becker de 1990, MAO Zifu en 1995, kaj — en la branĉo Kanto — Flávio Fonseca de 1993 kaj Tarcísio José de Lima de 1995.

Novuloj kaj revenantoj

Ĝenerale la Belartaj Konkursoj ŝajnas esti rigardataj kiel kampo de la ankoraŭ ne establitaj verkistoj. Tio tamen nenie estas eksplicite esprimita, kaj eble tiu sinteno en kelkaj periodoj malhelpis al la konkursoj ekhavi vere altan prestiĝon. De temp' al tempo tamen iuj jam konataj Esperantaj verkistoj kuraĝis konkuri kun la novaj talentoj. En 1975 ekzemple William Auld revenis post 18 jaroj al la Belartaj Konkursoj, gajnante premiojn pri tradukitaj poezio kaj prozo. En 1982 Johan Hammond Rosbach revenis post 24 jaroj, gajnante du premiojn pri poezio. Kaj en 1988 Tibor Sekelj revenis post 20 jaroj, gajnante premion pri prozo.

Ekde 1959 oni atribuas apartan premion, "Nova Talento", al la plej bona partoprenanto neniam antaŭe premiita. Tiu premio por multaj verkemuloj montriĝis esti vera salto-tabulo al pliaj premioj.

Pluraj personoj revenis, ofte jam en la sekva jaro, gajnante plurajn premiojn en sia branĉo, kelkfoje eĉ en pluraj branĉoj. Bona ekzemplo pri tio estas Wouter Pilger, Nova Talento de 1963, kiu poste en 1966 kaj 1967 gajnis kvin premiojn (el kiuj kvar unuajn!) pri poezio originala kaj tradukita. Alia Nova Talento, kiu poste abonis premiojn dum jardeko, estis Bernard Golden (1976). En pli malfrua tempo Jorge Camacho (1989) kaj Gonçalo Neves (1991)



AŬTORO PREMIITA

PREMIJOJ

PREMIJOJ + MENCIOJ

UNUA JARO

LASTA JARO

1.	Marjorie Boulton	22	25	1952	1962
2.	Bernard Golden	16	16	1976	1988
3.	Vesna Skaljer-Race	15	19	1962	1987
4.	Stefan MacGill	15	16	1977	1999
5.	Mauro Nervi	14	16	1978	1996
6.	Jorge Camacho	13	16	1989	1999
7.	Albert Samyn	13	14	1959	1964
8.	William Auld	12	16	1951	1982
9.	Andreo Szabó	12	13	1963	1975
10.	Gonçalo Neves	11	16	1991	1999

John S. Dinwoodie, Reto Rossetti kaj John Francis. En 1952 ni trovas du literaturajn stelojn el Ĉeĥoslovakio: Eli Urbanová kaj Jiří Kořínek, kaj la jam menciitan Marjorie Boulton. En 1953 inter aliaj Poul Thorsen estas premiita, en 1954 Claude Piron, en 1957 Edwin de Kock kaj Clelia Conterno-Guglielminetti, en 1960 Miyamoto Masao, en 1961 Tibor Sekelj, en 1962 Vesna Skaljer-Race.

La krizo de la sepdekaj

La 70-aj jaroj estis kriza periodo de la Belartaj Konkursoj, precipe koncerne prozon. De 1969 ĝis 1975 oni neniam atribuis unuan premion de prozo. Oni demandas sin ĉu eble la krizo koncernis ĉefe la juĝkomisionon. En 1973 kaj 1974, la du lastaj jaroj de juĝado fare de la triopo Gaston Waringhien, Roger Bernard kaj Emilija Lapenna,

ripetis tiun bravaĵon. Aliaj Novaj Talentoj tamen ne sukcesas — aŭ ne zorgas — reveni por pliaj premioj.

Ankaŭ la fakto ke kelkaj personoj konkeris plurajn premiojn, vekis iom da zorgoj. Tamen ne eblas diri ke iu limigita kliko akaparis ĉiujn premiojn, blokante la aliron al aliaj. Dek personoj gajnis pli ol po dek premiojn kaj per tio kaptis preskaŭ kvaronon el ĉiuj asignitaj premioj. 31 personoj gajnis inter kvar kaj dek premiojn, konkerante sume pli ol la duan kvaronon el la tuto. 55 personoj kun po du aŭ tri premioj kaptis iom malpli ol kvaronon.

☞ Kaj proksimume 150 personoj gajnis po unu premion, tiel kaptante la lastan kvaronon el ĉiuj asignitaj premioj. Al tiuj premiitoj oni aldonu tridekon da personoj, kiuj neniam ricevis premion, sed atingis honoran mencion.

En la komenco de la historio de la Belartaj Konkursoj la sama persono povis gajni premiojn jaron post jaro, sed ekde la mezo de la 80-aj jaroj validas la nuna regulo: kiu gajnis unuan premion en iu branĉo, dum tri postaj jaroj ne rajtas konkursi en tiu branĉo.

Kiuj venkas atute

Ĉar konkursanto rajtas ĉiujare proponi maksimume tri verkojn en ĉiu branĉo de la konkursoj, oni kelkfoje trovas la atutan rezulton ke unu sama persono konkeras samjare unuan, duan kaj trian premiojn en unu branĉo. Tio okazis al Vesna Skaljer-Race pri poezio originala en 1964, al Mauro Nervi pri poezio dufoje, en 1981 kaj en 1984, al Jorge Camacho pri prozo en 1990, al Paul Gubbins pri teatraĵo dufoje, en 1994 kaj 1999 (tiun lastan fojon li efektive ricevis du egalajn unuajn premiojn plus unu trian).

Se oni listas la premiojn laŭ la loĝlando de la premiito, unu lando elstaras kiel senkonkura Mekko de la Esperanta literaturo. Tiu lando estas Britio, kun pli ol cent premioj. Precipe en la unua jardeko tiu pozicio estis elstara, sed ankaŭ en postaj jardekoj anglaj kaj skotaj esperantistoj furoras en la premiolistoj. Duarange oni trovas — ne surprize — Hungaron kun sesdeko, kaj — eble malpli atendite — Italion kun kvindeko da premioj. Ankaŭ Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio kaj Nederlando estas inter la pintaj landoj.

Ĉu iu daŭre grava parto de la Esperanta literaturo aperis en la Belartaj Konkursoj?

Kiam Gaston Waringhien en 1953 recitis en la 38-a UK de Zagrebo la verkon al kiu oni tiujare asignis la unuan premion de originala poezio, ĝi sendube vekis iom da atento pro sia malprudeco kaj spriteco. Eble iuj aŭskultantoj intue sentis ke tiu verko, la komenco de *La infana raso* de poeto jam iom konata el la skota skolo, William Auld, estos grava mejloŝtono en la Esperanta beletrio.

Ĉu tiu estis escepta kazo?

Antologia valoro

Se oni traegas la indkson de *Esperanta Antologio, Poemoj 1887-1981* (2-a eldono, UEA, 1984), oni povas konstati ke el la 63 poetoj naskiĝintaj post 1910, precize du trionoj, 42 personoj, aperas en la listo de premiitoj ĉe Belartaj Konkursoj. Inter la poemoj premiitaj kiuj aperas en tiu antologio, eblus citi dekojn. Krom la menciita *La infana raso* oni trovas el la plumo de Auld la poemon *Anna* (2-a

premio de 1951), de Poul Thorsen *Frua mateno en Saraĵejo* (2-a de 1954), de Juan de Oyarzábal *Fluadoj* (1-a de 1956), de la hodiaŭ pli-malpli forgesita Albert Samyn, multfoja premiito, *Intimo* (1-a de 1959), de Jiří Kořínek *Romanco F-majora de Beethoven* (1-a de 1960), de Sylva Chaves *Homa Epopeo* (1-a de 1962), kaj tiel plu ĝis Eli Urbanová, *Tuko* (2-a de 1966) kaj Wouter Pilger, *Mia ĉio* (1-a de 1967).

Kaj kio pri la prozo?



Jam ekster la tempokadro de ĉi tiu eseo: en 2000 Nora Caragea ricevis BK-diplomon pro la "Infanlibro de la jaro", *La avo en la ĉareto*, kiun ŝi tradukis kaj eldonis.

Kvankam la limigoj de la Belartaj Konkursoj ebligas konkuradon nur inter mallongaj noveloj, tamen oni retrovas plurajn premiitajn verkojn ankaŭ en postaj libroformaj eldonoj.

Eble la plej rimarkinda ekzemplo estas tiu de Endre Tóth. Tiu hungaro, hodiaŭ pli-malpli forgesita en la Esperanta kulturo, estas karakterizebla kiel Esperanta Kafka. En 1974 kaj 1976 li gajnis tri premiojn pri prozo (1-a, 2-a kaj 3-a) en la Belartaj Konkursoj. Ĉiuj tri premiitaj noveloj enestas en lia sola libroforma verko, la novelaro postmorte aperinta *Lappar, la antikristo* (Hungara E-Asocio, 1982), unu el malmultaj kreaĵoj vere originalaj kaj valoraj de la Esperanta literaturo.

Alia eminenta ekzemplo estas la novelo *Nepagipova lando* de Spomenka Ŝtimec, 1-a premio de 1978, kiu poste aperis en ŝia novelaro *Vojaĝo al disiĝo* (HEA, 1990), kaj kiu en prilaborita formo ankaŭ formas ĉapitron de ŝia fama romano *Ombro sur interna pejzaĝo* (Edistudio, 1984). Sed oni trovas aliajn premiitajn novelojn ankaŭ en pluraj novelkolektoj. Se daŭrigi per Spomenka Ŝtimec, ankaŭ ŝiaj *Pruntitaj veroj* (3-a premio de 1986) kaj *Aŭstralio* (1-a de 1987) aperis en la supre menciita novelaro. En la kolekto *Vivo kaj morto de Wiederboren* (Sezonoj, 1998) aperas novelo kun tiu titolo de Clelia Conterno-Guglielminetti (1-a premio de 1959) kaj *Memo-roj de hommanginto* de William Auld (Laŭda Mencio de 1982). En la kolekto *La maŝino kiu kriis* (Pro Esperanto, 1995) aperis novelo de Marjorie Boulton, *La sekreto de la lernejestrino* (2-a premio de 1962). Kaj en la ibera kolekto *Ekstretoj* (IEM, 1997) oni trovas eĉ kvin novelojn konatajn de la Belartaj Konkursoj, de Miguel Fernández *Esencen persense* (Honora Mencio de 1993), de Jorge Camacho *Avataro* (2-a de 1994), *Gulivero en Ĉapelujo* (3-a de 1994) kaj *Neniam plu* (3-a de 1995), kaj fine de Liven Dek *Marta kaj Maria* (2-a de 1995).

Nivelo ĉiam varia

Laŭ la specimenoj hodiaŭ konsulteblaj estas malfacile juĝi ĉu la nivelo de la verkoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj iel ŝanĝiĝis dum la kvindek pasintaj jaroj. Estas jam

"Arde, amuze..."

"...al la nova epoko!" – sub tia slogano japanaj esperantistoj festis sian 87-an landan kongreson (Kumamoto, 13-15 okt.).

Ĉirkaŭ 430 esperantistoj alvenis, i.a. aktivuloj el Aŭstralio, Ĉinio, Germanio, Koreio, Pollando kaj Vjetnamio.

Elstara aspekto de la kongreso estis la nombro de eminentaj ne-Esperantaj organizoj kiuj ĝin aŭspiciis kaj finance subtenis. Grupo de aktivuloj, inkluzive vian prezidanton, vizitis kelkajn el ili por danki kaj por pridiskuti la meritojn de Esperanto. Bona informado — ĵurnale, radie kaj televide — estis semata tra la regiono.

Manko de spaco ne permesas listigi ĉiujn indajn programerojn. Kunsidon havis multaj fakaj grupoj, ekz. tiuj de Oomoto kaj SAT. (Iom surprizis min ekscii ke 91 SAT-anoj loĝas en Japanio!) El la prelegoj de la Kongresa Universitato mi menciis nur tiujn, bonegajn, kiujn mi mem aŭskultis: "Kio estas por ni Azio?" de TAKEUTI Yosikazu, distingito de Premio Osaka en 1999, "La Familio Zamenhof" de Zofia Banet-Fornalowa [vd. p. 213], kaj "Ligo de Nacioj, Esperanto kaj

d-ro Nitobe Inazō" de UEA-prezidinto prof. LEE Chong-Yeong. Ĉi lasta estis iom provoka rilate al Nitobe.

Post la fino de la kongreso mi, mia edzino, Daniel König el Germanio, Zofia Banet-Fornalowa kaj Jerzy

kaj al instruistoj de la angla lingvo esprimintaj intereson pri Esperanto. Tio okazis sukcese. Jerzy Fornal ĉiujn bonege amuzis per sia aktorado en Esperanto.

Ni ŝuldas multajn gratulojn kaj dan-



Preleginte pri "Kial angle parolantoj agas por Esperanto?", Kep Enderby ripozas en hotelo kun (de maldekstre) KAKEHI Kunimaro, sia edzino Dorothy kaj Daniel König el Heidelberg, germana ĝemelurbo de Kumamoto.

Fornal restis semajnon por prelegi al lokaj grupoj de neesperantistoj: al ordinaraĵoj, al studentoj kaj profesoroj de altlernejoj kaj universitatoj,

kojn al la du lokaj organizaj grupoj. Mi aparte ŝatus danki al s-ro YOSHIDA Masanori kaj al ĉiuj liaj helpantoj.

Kep Enderby, prezidanto de UEA

menciita la "valo" de la fruaj 70-aj jaroj, sed — kiel dirite — estas dube ĉu tiu konsistis el pli postulemaj juĝantoj aŭ el malpli valoraj kontribuadoj. Cetere oni povas nur konstati ke la nivelo ŝajne ĉiam estadis varia. Ofte premiigas verkoj kie diletantismo apenaŭ estas kaŝebla, sed de temp' al tempo tra la kvin jardekoj oni trovas ankaŭ verkojn valorajn kaj vere originalajn. Kaj sendube oni devas elteni malfermadon de multaj malplenaj konkoj por trovi la rarajn perlojn. Nature, ne eblas scii ĉu krome troviĝis valoradoj kiujn la juĝantoj neglektis...

Ĉu la Belartaj Konkursoj havas malfortajn flankojn?

Sendube jes. Konate estas ke la branĉo Teatraĵo kvante kaj kvalite longe postrestas al la aliaj branĉoj. Estus strange se ne estus tiel. Dramo estas tute aparta arto, kie diletantismo tuj vidiĝas. Kaj manke de Esperantaj teatroj, ĝi estas krome arto al kiu mankas uzantoj, "merkato".

Ankaŭ la Proza branĉo eble iom suferas de malalta, aŭ ĉiokaze malregula, kvalita nivelo. La limigo de longeco ĉe la konkurantaj verkoj eble povas iom ĝeni kelkajn verkantojn, sed sendube estas benata de la juĝkomisionanoj.

Eble estus bone, se oni povus logi pli da verkistoj jam establitaj al partopreno. Kompreneble oni riskus ke tiuj konkerus ĉiujn premiojn, lasante nenion al novaj talentoj, tamen ne estas tre kredinde ke tio vere okazus. Eble eĉ la mala embaraso pli kredindus: ke la pintuloj ne rimarkeble superus la amatorojn...

Kaj la estonteco?

La ĉefa problemoj de la Belartaj Konkursoj eble kaŝiĝas en ĝia formo de konkurso, al kiu la verkinto mem proponas verkojn ne publikigitajn. En neniuj branĉoj oni prijuĝas tion kio estas eldonita. [Kun la escepto de la branĉo "Infanlibro de la jaro". — Red.] Troviĝas aliaj tiaj premioj, sed neniuj tiel prestiĝaj kiel la Belartaj Konkursoj de UEA. Tamen ŝajnas nekonsilinde ŝanĝi tiel bazan trajton de institucio kiu jam eniras sian duan duonon de jarcento. Prefere oni konservu kaj flegu la Belartajn Konkursojn proksimume en ties ĝisnuna formo, kaj esperu ke iom post iom paralele kreskos ĝenerale respektata premio de jam eldonitaj verkoj, kie precipe la romanoj povus havi sian meritan lokon. ★

Esperanto en radio



Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutagaj elsendoj

09:30-10:00*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
11:00-11:27	Ĉina R. Int.	7170, 7150	Azio Orienta, Japanio, Koreo
13:00-13:27	Ĉina R. Int.	11650, 11840	Azio Sudorienta
14:30-15:00*	Pola R. Varsovio	7285, 7275, Sat (1)	Eŭropo
19:00-19:30*	Pola R. Varsovio	7130	Eŭropo
20:00-20:27	Ĉina R. Int.	7265, 9965, 7110	Eŭropo
20:00-20:30*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
22:30-22:57	Ĉina R. Int.	9860, 11700	Ameriko Latina
00:00/24:00	Pola R. Varsovio / WRN		TTT (30min.)

Dimanĉaj elsendoj

07:00-07:30	R. Havano Kubo	9820	Azio Pacifika, N. Ameriko
15:00-15:30	R. Havano Kubo	11760	Ameriko, Karibio
19:30-20:00	R. Havano Kubo	13750, 13715, 13660	Eŭropo, Mediteraneo
20:20-20:30*	R. Vatikana	527, 1530, 4005, 5880	Eŭropo
20:20-20:30*	R. Vatikana	Sat (5)	Ameriko
20:20-20:30*	R. Vatikana	TTT, TTT(9)	
21:30-21:55	R. Aŭstria Int.	6155, 5945, Sat (3), Sat (8)	Eŭropo
21:30-21:55	R. Aŭstria Int.	13730	Afriko Norda
22:00-22:30	R. Havano Kubo	13750, 13715, 13660	Eŭropo, Mediteraneo
22:50-22:59*	R. Vatikana	527, 1530, 4005, 5880	Eŭropo
22:50-22:59*	R. Vatikana	TTT, TTT(9)	
23:30-24:00	R. Havano Kubo	11760, 9505, 6070	Ameriko, Karibio

La dimanĉa elsendo de R. Vatikana okazas ankaŭ dum kristanaj festotagoj, sambore.

Dum aliaj tagoj

0:00-24:00	Estona R.		Mondo, TTT (15min., marde)
20:20-20:30*	R. Vatikana	1611, 7250, 9645	Eŭropo (merkrede)
20:20-20:30*	R. Vatikana	Sat (6)	Azio, Afriko (merkrede)
20:20-20:30*	R. Vatikana	1611, 7250, 9645	Eŭropo
20:20-20:30*	R. Vatikana	Sat (6)	Azio, Afriko
21:30-21:55	R. Aŭstria Int.	6155, 5945, Sat (3), Sat (8)	Eŭropo (vendrede)
21:30-21:55	R. Aŭstria Int.	13730	Afriko Norda (vendrede)
20:00-20:20	RAI Internacia	5955, 7290, Sat (7)	Eŭropo (sabate)
0:00-24:00	Västerås Narr.		TTT (15min., regule)
0:00-24:00	Korea E-R. I.		TTT (regule, nereakta)
0:00-24:00	R. Saluton		TTT (regule, nereakta)

*Programo kies horo estas konstanta laŭ MezEŭropa Tempo (do ŝanĝiĝos ekde 25 marto 2001). Nuntempe, MET=UTC + 1 h.

Sume, ĉiusemajne ĉirkaŭ 08:24 da originalaj programoj kaj 34:55 da elsendoj.

Tramonde peronde

Radio Aŭstria Internacia: La E-elsendoj, kiujn minacis haltigo, feliĉe daŭras, dank' al financa subteno de aŭskultantoj kaj reklamcelaj disaŭdigoj. Tamen, restis nur 2 E-elsendoj. Ĵus aperis, en limigita kvanto, jubilea kompaktdisko kaj kasedo, mendebla ĉe la redakcio. **Estona Radio:** Pro ekonomiaj kialoj la estraro planas ĉesigi plurajn programojn, i.a. la ĉiusemajnan E-elsendon. Sendu proteston al la estraro de Estona Radio (adreso sube; nin.english@er.ee).

Adresoj

Radio Aŭstria: ORF, Esperanto, AT-1136 Wien; [+43/1/878-784-404](tel:+431878784404); roi.esperanto@orf.at, <http://roi.orf.at/esperanto/welcome.html>
Ĉina Radio: Esperanto, 16A Shijingshan Str., CN-100040 Beijing; [+86/10/68-89-19-40](tel:+861068891940); [+86/10/68-89-13-88](tel:+861068891388); espradio@cri.com.cn, <http://www.cri.com.cn/>
Estona Radio: Esperanto, Gonsiori 21 EE-15020 Tallinn; [+372/6/114-446](tel:+3726114446); [+372/6/114-369](tel:+3726114369); uudised@er.ee, <http://er.ee/eng/uudis/>
Havana Radio: Esperanto, P.F. 6240, La Habana; [+53/7/795-007](tel:+537795007); [+53/7/795-729](tel:+537795729); kubesp@ip.etcusa.cu, <http://www.radiohc.org/>
Pola Radio: Esperanto, Skrytka 46, PL-00977 Warszawa; [+48/22/645-93-58](tel:+48226459358); [+48/22/645-59-17](tel:+48226455917); esperanto.redakcio@radio.com.pl, http://www.radio.com.pl/polina/esperanto_eo.asp
RAI Internacia: Esperanto, C.P. 320 Centro Corr. IT-00187 Roma; [+39/6/33-17-18-95](tel:+39633171895); silviaradio@rai.it, <http://www.international.rai.it/radio/index.htm>
Vatikana Radio: Esperanto, SCV-00120, Vatikano; [+39/6/69-88-53-51](tel:+39669885351); [+39/6/69-88-53-51](tel:+39669885351); esperanto@vatican.va, http://www.vatican.va/news_services/radio

Satelitaj indikoj (nomo kaj pozicio de satelito, frekvenco kaj polarizado [+ nomo de la televid-kanalo], frekvenco de la aŭda subportanto)

- (1) Pola R. Varsovio Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (kanalo 45, Bayern 3), 8.10 MHz, per Astra Digiata Radio (ADR)
- (3) R. Vatikana Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Ameriko)
- (4) R. Vatikana Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)
- (5) RAI Internacia Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.446 GHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz
- (6) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 12.692 GHz Hpol, en ORF-DVB-Bouquet, SR 22.000, FEC 5/6

Fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de E-o en Radio; <http://osiek.org/aera/frekvint.html>

Fabel-festo en Finnlando

Raita Pyhälä - Finnlando

Internacia konkurso kun Esperantlingva branĉo donis fabelecan okazon al finnaj kaj alilandaj infanoj por ekkoni unu la alian – kaj Esperanton.

Bivakfajroj kaj lumĵetiloj sub fajna pluveto kreis misteran, fabelecan etoson dum la premiada festo de la Esperanta kaj finna fabelkonkursoj de Päätaalo-instituto* en la norda urbeto Taivalkoski la 18-an de oktobro.

Pro la longaj distancoj nur tri premiitoj ĉeestis, la fratinoj Tauriainen kaj Stefani Strunjek el Kroatio (kun instruistino Judita Rey-Hudeček). Ĉi tiuj povis alveturi pro kunlaboro de pluraj personoj kaj la finna flugkompanio FINNAIR. En la flughaveno de Kuusamo atendis ilin la personoj de la fabelo de Stefi: Julavo, Nègreĝino kaj koboldoj. Laŭ la loka gazeto, “Stefani envojaĝis sian propran fabelon”.

La plenkreskulan e-istaron reprezentis kvar membroj de E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj kaj, surprize, la ferianta ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, kiu alportis infanlibrojn premie.

La iniciatintino de la E-branĉo de la konkurso, Aini Vääräniemi, legis la nomojn de la premiitoj. Konkursis entute 25 verkoj el 8 landoj, en tri aĝkategorioj. Ĉe la aljuĝo gravis kreiveco, originaleco kaj enhavo, ne lingva senarereco. Premiigis: sub 9 jaroj Hajnal MacGill (Hungario, 1.), grupo el Châteauroux (Francio, 2.) kaj Niina Tauriainen (Finnlando, 3.); ĉe 9-10-jaruloj



Foto: Raita Pyhälä



La loka gazeto *Koillissanomat* detale raportis pri la alveno de Stefani (sidanta meze) kaj la fabelkonkurso.

**Premiitinoj
Kirsi kaj Niina
Tauriainen,
kun Aini
Vääräniemi**

grupo el Châteauroux (1.), Stefani Strunjek (Kroatio, 2.) kaj Kirsi Tauriainen (Finnlando, 3.); ĉe 11-12-jaruloj Iitu Leinonen (Finnlando, 1.), klaso 5 el la lernejo “Kvar ventoj”, Châteauroux (2.) kaj Zlatko Đorđević (Jugoslavio, 3.).

Stefani brave, klare laŭtleĝis el sia fabelo *Nègreĝino*. Post aplaŭdoj oni diskonis la premiojn en la finnlingva branĉo, al kiu estis veninta milo da fabeloj.

Sekvatage la du kroatinoj vizitis, kun Raita Pyhälä kaj Sylvia Hämäläinen, du lokajn lernejojn, por konatigi po sesdekon da infanoj kun E-o lude,

kante kaj rakonte. Ili ankaŭ partoprenis la ceremonion “Arbaro de Zamenhof”, dediĉante arbon al sia lando. Alian arbon Osmo Buller dediĉis al UEA.

Per almenaŭ kvin ampleksaj gazet-raportoj pri la festo, Esperanto iĝis iom pli konata. Espereble la E-lingva branĉo de la konkurso reokazos venontjare kaj instigos al eĉ pli vasta partopreno.

*Edukcentro por verkistoj: <http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/> (kun la nomoj de la premiitoj kaj la plej bonaj fabeloj).

KLEKS en sia nigra serio prezentas...

LA LADA TAMBURETO

de Günter Grass, en traduko de Tomasz Chmielik

“Aperinta en 1959 kiel verko skandala, *La lada tambureto* estis dum jaroj objekto de kritikaj atakoj. Hodiaŭ ĝi estas plej grava verko de la postmilita germana literaturo.” (H. M. Enzensberger).

Bielsko-Biala: KLEKS, 2000. 533p. Bindita. € 36,00. Serio Oriento-Okcidento n-ro 33. Triona rabato ekde tri ekz. ĉe UEA.



INTERNACIA SEMAJNO DE AMIKECO

La lasta plena semajno de februaro (de 18. ĝis 24.) staros sub la devizo “Amikeco trans limoj”.



Amikeco trans limoj

Kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de internacia lingvo, ĝi estas aparte taŭga okazo por aranĝi komunan eventon kun ne-esperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj.

El kelkara korespondado inter Svedio kaj Tanzanio — inter la Esperanto-klubo de Lund (LEK) kaj Pacamanta Esperanto-Rondo (PER) en Mwanza (vidu apr. '99, p. 63) — rezultis fruktodona interŝanĝo de ideoj kaj kunlaboro.

Afrikan geamikoj ofte plendis: pro la bezonoj de kuirado forbrulas tutaj arbaroj valoraj. Tio vekis ĉe LEK la ideon proponi uzadon de sunenergia. Troviĝas multaj tipoj de tiel nomataj sunkuiriloj sur la merkato, pli-malpli taŭgaj, ĝenerale faritaj el ondokartono kun surgluita alumina folio. Kiun modelon uzi? Laŭ la teknikisto, LEK-ano Sture Andersson, necesas elekti parabolan formon, kiu reflektas la sunradiojn al unu punkto, nome la fokuso. Kuirpoto nigra — aŭ almenaŭ malhelkolora — estu metita tien. (Nigra surfaco transformas lumradiojn en varmon.) La problemo estis trovi formon taŭgan por tiu materialo kaj laŭeble plej similan al la parabola korpo. Tiel estiĝis la okfaca kuirilo, ĉiuface kun du faldoj. Ĝusta formo tamen ne sufiĉis, ankaŭ la labormetodo gravis. Iom post iom ĝi pliboniĝis, kaj efektiviĝis sukcesaj eksperimentoj helpe de ofta korespondado inter LEK kaj PER.

Daria Bitoro (PER) sukcesis organizi apartan virinan grupon por la farado de sunkuiriloj, kiu bone kunlaboras kun alia PER-ano, Ambrose Polle, respondeca i.a. pri la senproblema funkciado de la projekto el lingva vidpunkto.

Fabriki ekster fabriko

En la lastaj jaroj cirkulis multaj ideoj pri sunkuiriloj — sed ĉiam temis pri farado en fabriko, kaj plej ofte tiurilataj projektoj estas forte subvenci-

Kie suno kuiras, Esperanto kuniras

Sture Andersson kaj Anna-Maria Lange · Svedio

"Kunagado kun afrikanoj perfekte eblas" — emfazas niaj aŭtoroj, membroj de E-klubo en Svedio, priskribante funde pripensitan projekton de praktika kunlaboro kun tanzaniaj esperantistoj.



Interkonsiliĝo dum farado de sunkuirilo. Dekstre: Barnabas Magesse, meze: Ednesta Samwello, prezidantino de Bukoba E-klubo.

ataj de grandaj internaciaj organizaĵoj. Kadre de ili la sunkuiriloj vendiĝas je varia prezo. La homoj tiel ricevas pretan objekton, kiu certe signifas helpon, sed kiu ne instigas al evoluo. Krome, la sponsoroj ne havas neelĉerpeblajn fontojn.

Kontraste al tio, nia koncepto estas ke la unuopa homo mem faru sian sunkuirilon, uzante ĉefe materialojn

loke troveblajn. Montriĝis i.a. ke ondokartono en Tanzanio multekostas kaj malfacile troveblas. Tiam, survoje al plej favora solvo, ekaperis nova ideo.

Pense sub pomarbo

Pritranĉante siajn pomarbojn Sture Andersson ekhavis la jenan penson. Por konstrui kabanojn, afrikanoj uzas vergojn, plekt-materialojn kaj argilon

Mwanza – Montendre – Lund

Unue mi devas konstati ke por mi sen Esperanto nenia kontakto kun blankuloj eblus. Kvankam mia patro iam estis en Aŭstralio kaj povis interrilati kun la homoj tie, mi persone ne imagis ke mi iam konatiĝos kun eksteruloj.

Aŭdinte pri la ekzisto kaj facileco de Esperanto, mi tuj decidis fervore lerni ĝin. Homoj ĉirkaŭ mi ne komprenis ke mi perdas tiom da tempo por lerni neutilan lingvon. Iuj eĉ konsilis al mi pli bone lerni la anglan, asertante ke kiam mi vere ĝin regos, mi havos la okazon

viziti la tutan mondon! Pro amo al la internacia lingvo mi ne toleris ilian sugeston kaj respondis ke mi jam lernis la anglan lerneje.

Kiel nur trimonata esperantisto mi trovis mian unuan amikinson en Esperantujo, nome s-inon Janine Dumoulin. Profesie ŝi estas instruistino pri la franca kaj latina en mezlernejo de Montendre (Francio). Tiu tre bonkora virino regule korespondis kun mi kaj igis min memfidi kaj ami la lingvon ankoraŭ pli.

Krome mi havis kontakton kun s-ro Alfred Wallbacher kaj s-ino Eleonora Allendorf en Germanio. Spertante la vivon de esperantisto, mi klopodis pli kaj plu lerni la lingvon. Survoje mi trovis

miksitan kun sterko. Kial do ne uzi la samajn materialojn por fari sunkuirilojn? De penso al konkreta elprovo! Post komenca malsukceso, al Sture Andersson prosperis krei plene funkciantan kuirilon plektitan, en kiu eblis boligi 5 litrojn da akvo, spite ke la aera temperaturo estis, ja en Svedio, nur 22 gradoj.


Teknikaj priskriboj kun bildoj estis kompilitaj kaj senditaj al Mwanza. La virina grupo komencis la faradon de tiu kuirilo, kaj aperintaj malfacilaĵoj solviĝis letere. Tute neatendite, granda helpo venis lastatempe de du E-grupoj agantaj sub la gvido de Barnabas Magesse, en Bukoba kaj en la proksima Kayanga, ĉe la Viktoria Lago. Menciindas ankaŭ laboro de Mramba Simba (Bunda, Tanzanio).

Detalaj raportoj pri la plensukcesa farado de sunkuiriloj kaj fota dokumentado pri ĉiu unuopa paŝo en la farado signifas konsiderindan progreson survoje al la plej kontentiga rezulto. La evolu-laboro pludaŭras.

Por ekonomie apogi la projekton, LEK kunlabore kun PER kaj komuna amika rondo en Montendre (Francio) faris i.a. kalendarojn por 1999 kaj 2000. La tre sukcesa vendo indikas ke esperantistoj ĉiukontinente pozitive reagas al niaj klopodoj.

Ne nur bildkartoj

Grandaj celoj, altaj ambicioj — kial ne? Per ĉi tiu raporto ni volis montri ke kunagado kun afrikanoj perfekte eblas. Konsilindas ne labori sola, provi krei reton kun aliaj grupoj, sed ankaŭ



La 6-an de aŭgusto estis oficiale inaŭgurita en Mwanza (Tanzanio) klubejo de Pacamanta Esperanto-Rondo. Al ĉeestantaj gastoj klubanoj prezentis i.a. la celojn de Esperanto kaj de la aktivado de PER, krome la ĝis nun atingitajn paŝojn rilate al la farado de sunkuiriloj. Sur la bildo: PER-ano Jerry Fundi (maldekstre) donas klarigojn al ĵurnalisto de loka gazeto.


kun unuopaj interesatoj. Ni, E-klubo de Lund (p/a Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, SE-22221 Lund, Svedio) ŝatus instigi ankaŭ aliajn al kontaktoj kun afrikaj e-istoj. Certe ne nur temos pri banala interŝanĝo de belaj bildkartoj...!

RET-INFO

Retpoŝta Esperanto-novaĵservo
<http://www.esperanto.hu> ret-info@esperanto.org

s-ron Hans Bakker en Nederlando, komisiiton pri la afrika agado de UEA. Tiel mi malkovris la landon Esperantujo, en kiu ekzistas nur bonkoraj homoj. Kial mi diras tion? Ĉar tiu sinjoro, kvankam li konis min nur per leteroj, zorgis pri mi kiel pri sia propra infano. Li ebligis al mi studi la lingvon ĉe Esperanto-Asocio de Britio, kie mi sukcese trapasis la elementan ekzamenon en 1998. Grandan rolon li ludis ankaŭ en la ekesto kaj funkciado de nova rondo en Mwanza, nia Pacamanta Esperanto-Rondo. Estis s-ro Bakker kiu ankaŭ peris la kontakton inter PER kaj la Esperanto-klubo en Lund (Svedio).

Ambrose F. Polle, Pacamanta E-Rondo, Mwanza, Tanzanio



ĈU NI SERĈAS VIN?

Multaj esperantistoj membriĝus en UEA, se iu proponus al ili tion kaj ricevus ilian kotizpagon.

Tial UEA densigos la reton de kotizperantoj.

Skribu al la Direktoro de la CO, se ĝuste vi estas unu el la iniciatemuloj kiujn ni serĉas!

UEA

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam, Nederlando

+31 10 4361751

uea@inter.nl.net

Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

Gvidlinioj prinotitaj

“Gvidlinioj por informado” (okt., p. 162) prave deklaris ke malmultaj lernos Esperanton pro ĝia facileco, sed ĉar “ĉiu povas igi [ĝin] sia propra lingvo”. Varbante, indas substreki faceton de tio: novuloj, per talento kaj/aŭ diligenteco, povas atingi la lingvan kaj sekve komunuman nivelon de akademiano aŭ denaskulo, eĉ komencante la studon en meza aŭ pensiula aĝo. Tio validas por neniu etna “internacia” lingvo.

En la sekcio “Rimedoj”, plej okulfrapas la manko de mencio pri la rolo de fakaj asocioj. Notite estas ke transnaciaj organizoj en la mondo konsistigas gravan celgrupon, des pli ĉar ili jam havas internacian dimension kaj riskis jam rimarki la sekvojn de lingvaj problemoj. Baza regulo en informado estas bone koni vian celgrupon. La fakaj asocioj de

UEA kaj de la movado, kvankam de varia forteco, devus havi informofakojn kaj esti kultivantaj rilatojn kun tiaj grupoj. Pro tiu ŝlosila rolo, ili meritis specifan mencion en ĉi tiu komitata dokumento.

Stefan MacGill • Hungario

Letero laŭdindas

Gratulon por la kongresa numero, kiu tiel bunte pentris la UK-n! Tamen pri *La ŝtelita letero* (sep., p. 151) necesus pli juste reliefigi la kuraĝon de la Zagrebaj gejunuloj, kiuj tre kreive utiligis rimedojn neordinarajn. Laŭdindas ke tiu studentaro inventeme elpensis rimedojn por sursceniĝi ĝin. La “Letero” simple ne retroviĝis ĉar ĝi restis kaŝita malantaŭ la spektantaro: la ununivela spektejo bedaŭrinde estis tute ne taŭga. Ĉe prezento en taŭga loko certe multe pli valorigus la intrigo.

James Rezende Piton • Brazilo

Tian tradukon trovi malfacilas...?

Mi scivolis kion diros Nervi pri Södergran (jul.-aŭg., p. 134). Sed tian komencon kaj finon (ke tiajn verkojn ni malfacile trovas en nacilingvaj tradukoj) mi jam vidis en tro da kuntekstoj. En angla poezia biblioteko mi trovis kvar simile ampleksajn elektojn el Södergran. Franca elekto mencias du pluajn francajn. Mi vidis iam estonan. Kaj supozeble tiel plu. Nu, Nervi per *Blinda Ermito* de M. Caprile ĝuste prezentis poeton kiun mi alie ne konus. Sed ne ĉiuj tradukistoj elektas tiel. Ankaŭ *La tragedia de l' homo* ekzistas en pluraj anglaj versioj, eĉ kuŝas “en ĉiu brokantejo”. Supozeble fuŝa do (sufiĉas unu fuŝa traduko por krei antaŭjuĝon), dum ni havas elstaran... Nu, tion mi scivolis, pri la kvalito de *Lando malekzista*.

Kris Long • Britio

Ran-kvarteto

Al Dafydd ap Fergus, Brusela esperantisto kiu plendas pri malĉeesto de Esperanto en Bruselo (nov., p. 188), mi rekomendas legi la poemon *Ran-kvarteto* de Julio Baghy. Oni trovas ĝin en *Esperanta Antologio*, sur la unua KD de Kajto aŭ en la reto sub http://www.webcom.com/~donh/don/esplit/Ran_Kvarteto.html.

Ulrich Matthias • Germanio

Nia alfabeto: ĉu eŭropa?

Reage al KATOO Ivao (jul.-aŭg., p. 128): Laŭ John Man (*Alpha Beta*, “Kiel nia alfabeto ŝanĝis la okcidentan mondon”), la eŭropa alfabeto estas prapraido de la egipta praskribmaniero, pere de triboj kiuj vivis en okcidenta Azio.

Margaret Furness • Aŭstralio

Gratulindaj “Dialogoj”

Gratulojn al UEA pro la decido donaci monon por la projekto “Indiĝenaj Dialogoj”.

Tiu informo en la fermo de la UK en Tel-Avivo plejbonis. Espereble ĝi instigos ankaŭ landajn asociojn, lokajn klubojn kaj individuajn e-istojn agi simile. Per tiu projekto la lingvo Esperanto povas ja montri sian povon por la tuta mondo. Post la sukceso de ĉi tiu projekto ankaŭ aliaj internaciaj organizoj, projektoj verŝajne akceptos tre taŭgan ilon — Esperanton.

Subtenante la projekton unuopaj e-istoj montras sian respekton al plej diversaj kulturoj. Por ni, esperantistoj, gravas ne nur E-kulturo: “Esperanto fariĝu konkrete ĉies dua lingvo!”

Synnöve Mynttinen • Finnlando

Thorsen-apogoj al 15 bibliotekoj

UEA disdonis por la kvara fojo subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Rekorda nombro de 28 Esperanto-bibliotekoj el 21 landoj sendis peton. La juĝkomisiono povis ĝojigi 15 bibliotekojn, inter kiuj estis dividita la sumo de 1800 eŭroj.

La subvencio ricevis: Kataluna E-Asocio (€ 250); Vjetnama E-Asocio (€ 250); Bonaera E-Asocio, Argentino (€ 150); Chengdu-a E-Asocio, Ĉinio (€ 150); E-Biblioteko Novaj Horizontoj, Kolombio (€ 150); E-Societo La Progreso, Prilep, Makedonio (€ 150); Korea E-Asocio (€ 100); E-Societo Bude Borjan, Zagrebo, Kroatio (€ 100); Malta E-Societo (€ 100); Kultura E-Centro Angevin kaj E-Kulturcentro de Tuluzo, Francio (po € 75); E-Muzeo Lajos Gyula, Pécs, Hungario (€ 75); Animada Klubo de E-o, Zambio (€ 75); Bulgara E-Asocio (€ 50); Lipecka E-Klubo Revo, Rusio (€ 50).

Ekde la unua aljuĝo en 1997 ĝis nun, entute 43 Esperanto-bibliotekoj povis pligrandigi siajn kolektojn per subvencio de la Biblioteka Apogo. Pro la multeco de la petintoj la subvencio ankoraŭ ne estis asignita dufoje al sama biblioteko.

Petoj por la aljuĝo en 2001 devos veni al la CO de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2001. Ilin akompanu listo de dezirataj libroj ordigitaj laŭ prefero, ĉar la subvenciojn oni ricevas ne kiel monon sed kiel librojn. Konsiderataj estas nur bibliotekoj kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ekstermovada instanco.

NAVIGE

TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



LANDOJ, REGIONOJ

E-Societo Teslić, Serba Resp. en Bosnio kaj Hercegovino: <http://home.skaut.net/esperote/>
Kostarika Esperanto-Asocio: <http://www.esperanto.co.cr/>

LIBROJ, LITERATURO

Lingva utopiaĵo de Claude Piron (anglalingve): http://www.geocities.com/c_piron/2052reviziita.html

Originalaj romanoj en Esperanto: <http://www.dreamwater.net/esperanto/roman/>

POLITIKO

Virtuala kaj Globala Social-Demokrata Partio: <http://www.virtualaesperanto.f2s.com/>
"Kial mi estas mondcivitano": <http://perso.wanadoo.fr/mondanisto/lapagxoj.htm>,
kun reago al raporto de la UN-Komisiono pri Tutmonda Administrado

RELIGIO

Oficiala TTT-ejo de Oomoto: <http://www.oomoto.or.jp/Esperanto/index-es.html>
Venecia Sekcio de Itala Unuiĝo de Katolikaj E-istoj: <http://digilander.iol.it/esperantovenezia/ueci/ueci.html>

Japana Budhana Ligo E-ista nove fondis sian TTT-paĝon: <http://www13.u-page.so-net.ne.jp/wa2/syam-z/budhismo.indekso.html>

REVUOJ

La posteulo de *El Popola Ĉinio*, *Aktualaĵoj el Ĉinio* rapide ampleksiĝas: <http://www.china.org.cn/world/>. Legu ekz. "La Ĉina Interreta Informa Centro inaŭgurita" sub <http://www.china.org.cn/world/news02.htm>

Litova Stelo, ĝis nun enhavtabeloj kaj du artikoloj: <http://www.is.lt/LEA/ltstelo-h.htm>

TURISMO

De post nia unua mencio antaŭ du jaroj, kreskis la paĝaro pri la franca regiono Anĵuo, kun turismejoj viziteblaj per E-o: <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/anjou/>
Centro en Grekio por nova erao kaj kultura feriado: <http://www.zyworld.com/retejo/alianco.htm>

Vojaĝo pere de Pasporta Servo, spertoj de la juna usonanino Amanda Higley: <http://www.esperanto.org/tejo/la/amanda/>

DISSENDOLISTOJ

Finfine eblas orientiĝi inter ĉ. 100 Esperantaj aŭ E-rilataj dissendolistoj, pri ĉio de E-etimologio (<http://www.egroups.com/group/eo-etim>) ĝis la muziko de Persone (<http://www.egroups.com/group/persone>), per <http://purl.org/net/dissendo/>

CETERO

Vida indekso pri Esperanto en Interreto: <http://start.at/retilo/>

Historio, principoj kaj organizaj konsiloj pri la multlingva evento *Linguafest*: <http://linguafest.org/> kaj <http://www.esperanto.org/tejo/lf> (malsamaj paĝaroj)



RECIPROKA SALUTO

DE LA ISRAELA PREZIDENTO

En la ferma solenaĵo de la 85-a UK en Tel-Avivo la kongresanoj sendis gratulmesaĝon al s-ro Moshe Katsav, membro de la Honora Komitato de la UK, pro lia ĵus okazinta elekto al la ofico de la prezidento de la kongresa lando. Nome de la kongresanoj la mesaĝon subskribis Kep Enderby, prezidanto de UEA, kaj Amri Wandel, prezidanto de LKK.

Prezidento Katsav reciprokis la gratulojn per dankletero al prof. Wandel. La letero tekstas:

"Jerusalemo, 19 okt. 2000.

Al prof. Amri Wandel, Prezidanto de la LKK de la Universala Kongreso de Esperanto


Salom, kara prof. Wandel,
Multajn dankojn pro la bondeziroj kaj la gratuloj kaj speciale pro la varmaj vortoj, kiuj estis por mi fonto de kuraĝigo kaj kaŭzis al mi grandan plezuron. Ni devas elstarigi tion kio unuigas, agi por la forigo de la streĉoj en la socio kaj kondukti en reciproka estimo kaj en la spirito de nacia paciĝo. Ni agu kune por efektivigi la ŝtatajn kaj naciajn defiojn kiuj troviĝas antaŭ ni.

Koran saluton al s-ro Keppel Enderby, la prezidanto de UEA.

Kun saluto de bona nova jaro,
Moshe Katsav"

DUA VIVO POR KONTAKTO

Se vi estas abonanto de Kontakto, vi certe trovas tiun revuon leginda. Same opinias centoj da afrikanoj, kiuj pli frue ricevadis ĝin pro donac-abono pagita de Fondaĵo Afriko. Bedaŭrinde, la Fondaĵo ne plu eltenis tiun koston. Tamen, ekzistas solvo. Se vi donacos la revuon al afrikano (adresoĵ haveblas de ni), ĝi ekhavas duan vivon. Kontakto: Hans Bakker, Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎+31/20/642-18-53; ✉hbakker@groenlinks.nl.



Recenzoj

Historio

Bonvena kontribuo al movad-historio

1898-1998. Centjara asocia Esperanto-movado en Francio. Hervé Gonin (1947) kun la helpo de Jean Amoureux (1937). Paris: Unuiĝo Franca por E-o, 1998. 215p. 21cm. En tri kajeroj. € 21,80.

Hervé Gonin, asiste de Jean Amoureux, prezentis en la jubilea jaro 1998 cent jarojn da E-asocio en Francio. Kiel specialaj historiaj numeroj de *Franca Esperantisto*, la tri kajeroj ne aspektas grandioze, sed la enhavo informas pri multaj facetoj de centjara movado.

La Ido-krizo, la aliaj kvereloj inter moŝtuloj, E-o en la mondmilitoj, instruado en la 20-aj jaroj, la kultura domo en Grésillon — jen nur iuj el la interesaj temoj. Sed la pleneco kaj kompleteco povas ankaŭ iom tedi al leganto kiu volas nur foliumi. Vi povas legi ke de 1945 ĝis 1947 la membraro kreskis de 995 al 2269 personoj kaj ke “la plej multombraj federacioj estis en 1946 la pariza (545), rodana-alpa (510), norda (250) kaj langvedoka-rusiljona (174)”. Tamen ĉio estas tre superrigardebla, malgraŭ la ne tro profesiec-aspekta komposto.

Multaj biografioj, tabeloj kaj ilustraĵoj (en modesta pres-kvalito) pliriĉigas la bone legeblajn tekstojn. Ne nur la politiko de *Société Pour la Propagation de l'Espéranto*, de *Societo Franca por Esperanto* kaj *Union française pour l'Espéranto*, sed ankaŭ laboristaj kaj aliaj fakaj movadoj,

kulturo kaj eldonado trovas ĉhon en ĉi tiu impona laboraĵo de Hervé Gonin. Kiu estonte volas scii pli pri Esperanto en Fran-

cio, havos valoran konsultlibron.

La verko estas ofte kompila kaj reuzas jam malnovajn tekstojn, malkiel ekz. *Esperanto en Ruslando* de Gorecka kaj Korĵenkov. Tio iom klarigas la amplekson de 215 paĝoj. Apenaŭ ekzistas same grandaj prezentoj de movad-historio je nacia nivelo, kaj ĉi tiu certe tiklos aliajn landajn asociojn konservi la memoron pri la propra historio.

Ziko Marcus Sikosek · Germanio/Nederlando



Festa etoso en Montpeliero por la 100-jariĝo de la franca E-movado

Detalriĉa skizo

Esperanto en Ruslando. Historia skizo. Halina Gorecka (1959) kaj Aleksander Korĵenkov (1958). Jakaterinburg: Sezonoj, 2000. 39p. 20cm. € 4,20.

Jen interesa historia skizo pri la evoluo de la E-movado en Ruslando ekde la komenco en 1887.

Kelkaj ciferoj iom rakontu pri la varia situacio. En la jaro 1892-a 335 el la 544 abonantoj de *La Esperantisto* estis rusland-

anoj. En 1925, kiam cetere aperis la unua el pluraj sovetiaj poŝtmarkoj kun teksto en Esperanto, Sovetlanda Esperantista Unuiĝo havis 1765 membrojn; SAT havis post sia kongreso en 1926 preskaŭ 2000 membrojn en Sovetio, kaj SEU 6000 en 426 loĝlokoj. En 1928-32 venis skismo inter Sovetunio kaj SAT, kaj post la sekva periodo, kiam esperantistoj estis mortkondamnitaj kaj pafekzekutitaj, la movado nur malrapide renaskiĝis post la dua mondmilito. La agado de unuopaj esperantistoj kaj neformalaj grupoj ĉiam estis la plej grava forto en la ruslanda movado. Tamen la apero de Asocio de Sovetaj Espe-

rantistoj en 1979, kun 4000 membroj, iom faciligis la agadon, kvankam ASE fakte ne zorgis pri ĝi. Post glasnosto kaj perestrojko la situacio komplikiĝis, samtempe ekzistas pluraj organizaĵoj, sed ne ĉiam funkcias regula kolektado de kotizoj ks. Tamen, en Ruslando dum tiu tempo eldoniĝis pluraj libroj kaj okazis internaciaj kongresoj.

Por pli da detaloj, legu ĉi tiun valoran kaj klerigan libreton pri la historio de la ruslanda movado. Mia sola plendo estas ke oni plurloke skribas nomojn de ruslingvaj revuoj per cirilaj literoj. Tio ĝenas la legadon de tiuj kiuj ne scias legi ilin.

Leif Nordenstorm · Svedio

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdatan katalogon de haveblaj varoj konsultu ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Bato, La. Lena Karpunina (1963). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 2000. 125p. ISBN 90 71205 87 8. 21cm. Dek kvin rakontoj pri travivaĵoj plejparte en Sovetunio, de aŭtorino plurfoje premiita ĉe Belartaj Konkursoj. € 12,60.

Bonĉo la silentulo (1894). *La Epoko:* *Kajero 143(13)*. Ichok Lejbuŝ Perec (1852-1915). El la juda trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1993. 14p. 28cm. Novelo de unu el la tri fondopatroj de la juda literaturo, moderna romantikisto. € 3,60.

Cecilja. Tri poetaj romanetoj. Felix Timmermans (1886-1947). El la flandra trad. Lode Dorez, Pierre Anselme, Eugene Paesmans. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 2000. 106p. ISBN 90 71205 81 9. 21cm. Perloj el la verkaro de unu el la plej gravaj aŭtoroj nederlandlingvaj. € 11,40.

Epoko, La. Sendependa, kulturpolitika revuo. Kajero 1. Mérétki, Pacepa, Kozłowski. Svidniko, 1990. 41p. 28cm. Tekstoj pri la historiaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo. € 6,60.

Epoko, La. Kajero 2. Anatolij Ribakov (1912-99). El la rusa trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 18p. 28cm. Fragmento el la romano *Infanoj de Arbat*. € 3,90.

Epoko, La. Kajero 3. Cielan, Arendt, Szczypiorski, Krall, Balbin, Sutzkever. Svidniko, 1990. 39p. 28cm. Tekstoj pri la Holokaŭsto. € 6,60.

Epoko, La. Kajero 12. Varlam Ŝalamov (1907-82). El la rusa trad. Olga Kerzjuk. Svidniko, 1990. 19p. 28cm. El *Rakontoj el Kolimo*. Literatura atesto pri sovietiaj gulagoj. € 3,90.

Familio Zamenhof, La. Zofia Banet-Fornalowa (1929). La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2000. 226p. ISBN 3 906595 13 7. 21cm. Kun fotoj, mapoj, genealogia arbo. Detala prezento (rezulto de

plurjara esploro) pri la familianoj de L. L. Zamenhof, samtempaj kaj postaj al li. € 21,00.

